**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

N-ro 1/1977 - 4 jan 1977
Aperas ĉiusemajne

Semajno de
Internacia
Amikeco 1977

Salutu per
anonceto en
Pilo-Press!
Detalojn legu sur p. 3 !

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 463649; 514269



## Novjara mesaĝo de la UEA-prezidanto

La pasintaj du-tri jaroj instruis al ni multajn lecionojn. El ili, la plej klara estas la rimarkinda stabileco kaj interna forteco de la Esperanto-movado. Se necesus ankoraŭ pruvi tion, oni povus konstati, ke la Internacia Lingvo fariĝis neevitebla kaj nedetruebla fakto de nia epoko. La kulturo kaj socio de Esperanto estas firma elemento en la nuntempa internacia vivo.

Tio estas pli ol klara en la situacio de UEA mem. Tra ĉiuj perturboj de la tuj pasintaj jaroj, tra ĉiuj krizoj financaj kaj organizaj, UEA tenis la flagon alta kaj laboris diligente por konservi malnovajn gajnojn kaj prepari la grundon por novaj.

Nun ni komencas rikolti la rezultojn de tiu eksterordinara diligento - kaj ankaŭ lojalo - de nia centra stabo kaj nia membraro. En 1975 ni sukcesis registri pozitivan saldon post kelkjaraj deficitoj en niaj financoj. Feliĉe ni povas anonci similan rezulton en 1976. Kvankam la finkalkulo ankoraŭ ne estas preta, estas jam nun informeble, ke 1976 ankaŭ estos jaro de financa pluso. Tiu restarigo de la financa stabileco ankaŭ havis siajn konsekvencojn ĉe la membronombro: post kelkaj jaroj da perdo, en 1976 ni registris malgrandan gajnon en la nombro de individuaj membroj. Se oni aldonas al tio la aliĝon de kelkaj novaj landaj asocioj kaj la signifan plivastiĝon de la kolektiva abonado de la revuo, oni tuj ricevas bildon de asócio pli sekura, pli forta, kaj pli laborpreta ol ni vidis jam de pluraj jaroj.

Dum la venontaj monatoj venos ankaŭ pliaj ŝanĝoj, interalie en reorganizado kaj plifortigo de la Centra Oficejo kaj rilataj instancoj. Dum la pasintaj du jaroj ni jam faris kelkajn paŝojn tiudirekten, precipe per fondiĝo de la Volontula Servo. Ni povas antaŭvidi la formalan starigon de nova, aparta fako pri informado kaj esplorado dum la venontaj monatoj, la eldonon de nova librolisto kaj aliajn elpaŝojn de la Libroservo, kaj signifajn rezultojn de la laboro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kies plifortigita kaj modernigita revuo komencos aperi sub nova vesto ekde la Nova Jaro.

Tiu eksvingo de agado ĉe UEA stimulas kaj spegulas rimarkindan pliviglîĝon sur aliaj terenoj en kaj ekster la Asocio. La eldona agado, ekzemple, precipe pro signifaj kontribuoj el Britujo, Danlando kaj Japanujo, montras refortiĝon kaj novan vervon. Niaj kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj denove allogas la esperantistojn en kreskantaj nombroj. La kuraĝigaj aliĝociferoj por Rejkjaviko estas nur unu atesto pri tio -- kaj la impona nombro da aliĝintoj al la pasintjara TEJO-kongreso memorigas nin, ke precipe la junularo montras novajn fortojn. Ankaŭ la kampo de fakula interesiĝo pri Esperanto konstante firmiĝas -- ne nur en Paderborn aŭ Budapeŝto aŭ la La Chaux-de-Fonds sed ankaŭ en novaj lokoj kaj ĉe novaj homoj.

Estas bela periodo por labori por Esperanto. Kvankam la publiko restas skeptika, fermita en la propraj interesoj, ema al la propra prospero -- iom post iom, malrapide sed senteble, ni lernas kiel alpaŝi ĝin kaj kiel disciplini nin mem en la intereso de la pli granda idealo. Ĉefe ni devas ankoraŭ lerni kiel konvinki la publikon pri la graveco de la lingva demando -- pri la danĝeroj de lingva superregado kaj lingva diskriminacio, pri la kostoj de lingva diverseco, pri la neceso de

(daŭrigo sur p. 2)

Novjara mesaĝo de la UEA-prezidanto (daŭrigo)

tutmonda komunikilo -- kaj en tiun kunteksten injekti la ideon de la Internacia Lingvo Esperanto, sola praktika solvo de la tutmonda lingva problemo. Por atingi tion, necesas rapide kaj decide plifortigi precipe nian informadon kaj niajn eksterajn rilatojn ĝenerale. Necesas ankaŭ daŭrigi la utiligon de la Volontula Servo, kaj persvadi al niaj membroj dediĉi sin intense al Esperanto pere de tiu servo dum periodoj de ses monatoj, naŭ monatoj, unu jaro.

Aparte gravas, ke niaj aktivuloj, kaj tiuj kiuj ŝatus fariĝi aktivaj, venu al la 62-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko. Islando ne estas nur interesega kaj unika lando (kiu meritas viziton eĉ nur pro tio), sed ankaŭ estos la loko kie ni fiksos nian agadon por la venontaj jaroj, elektos novan Estraron, kaj pridiskutos demandojn signifajn, precipe por la eksteraj rilatoj kaj estonta sukcesigo de Esperanto.

La jaro 1977 portos nin al punkto nur dek jarojn for de la unua jarcento de la Internacia Lingvo. Ĉu tiu dekjara periodo kondukos nin al la sojlo de sukcesigo de la heredaĵo de Zamenhof? Tio dependos grandparte de nia kapablo je sagaco, sindediĉo kaj efika laboro. La jaro 1977, la komenca punkto de tiu eventuala decida jardeko, alparolu diligenton kaj laboron, sagacon kaj klarvidon, kaj feliĉon kaj finan sukceson al ĉiuj laborantoj por la Internacia Lingvo.

Nome de la Estraro de UEA kaj ĉiuj aliaj aktivuloj en ties organiza strukturo, mi deziras al vi pacan kaj prosperan jaron 1977

Humphrey Tonkin

**********************************

Komentario superflua

Pri lingvoinstruado

Berlin (pp) - La Komisiono de l' Eŭropaj Komunumoj ne favoras Esperanton kaj rekomendas la instruadon de pluraj naciaj lingvoj. Oni povus do opinii, ke grandajn avantaĝojn ĝuas la lernantoj instruataj per fremda lingvo, ekzemple la junaj berlinanoj kiuj vizitadas la "Französisches Gymnasium" (francan gimnazion) aŭ la "John-F.-Kennedy School". Ho ve! Eĉ ne ili....

Pasintan monaton la direktoro de la Franca Gimnazio plendis antaŭ mi, ke la germanaj instruistoj ĉiam pli emas peki kontraŭ la regularon, uzante la germanan lingvon anstataŭ la franca. La instruisto de greka literaturo prelegas pri Platono en la germana, pretekste ke ili ne trovis francan tradukon de tiu klasikulo....

Koncerne la pretendatan komunan instruadon de diverslingvanoj mi nur citu artikolon el la Berlina gazeto "Der Abend" (22.12.76) pri la John-F.-Kennedy Gimnazio: "En la klasoj de tiu supera lernejo, escepte de malmultaj fakoj, oni instruas aparte. Usonaj instruistoj staras antaŭ usonaj lernantoj, germanaj instruistoj antaŭ germanaj lernantoj. Oni asertas precipe, ke en tiu nivelo de la edukado la lingvaj konoj jam ne sufiĉas por klarigi ekzemple malfacilajn natursciencajn temojn".

Louis Beaucaire

## Semajno de Internacia Amikeco 1977

La Semajno de Internacia Amikeco 1977 okazos de la 20-a ĝis la 26-a de februaro. Kiel pasintjare Pilo-Press invitas la legantojn atentigi pri la amikeco trans limoj kaj saluti la esperantistan popolon per salutanonceto en Pilo-Press en la eldono de la 14-a de februaro 1977. Anonceto ĝis 25 vortoj kostas 2,- GM (pagebla per poŝtmarkoj aŭ tri internaciaj respondkuponoj aŭ per ĝiro). La salutteksto devas atingi la redakcion ĝis la 10-a de februaro 1977. Sendu al Ludwig Pickel, Pilo-Press, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1

Multaj salutanoncetoj kontribuos efike al la popularigo de la ideo de Internacia Amikeco! La proponon iniciatis KELI-Esperanto-Grupo Stuttgart.

## Pri Zamenhof-festoj

Esperanto-Grupo Würzburg okazigis tiun tradician feston la 20-an de decembro en ĉeesto de pli ol 20 personoj, inter ili 3 junuloj. Programeroj estis komuna vespermanĝo, lotumado de donacoj, lumbildprelego pri la UK en Ateno de d-ro Berger, memorigo pri Zamenhof kaj honorigo de meritplenaj grupanoj, i.a. de s-ro Friedrich Volk pro pli ol 50-jara agado por Esperanto. (Raportis o. Gessner)

La esperantistoj el Triesto, Italio, dufoje festis la Zamenhofan tagon. La triestaj esperantistoj iris la 12-an de decembro al Rijeka, Jugoslavio, por partopreni kunvenon okazigitan fare de la tieaj samideanoj.

La 19-an de decembro, la triestanoj ĉeestis esperantistan manifestacion en Venecio, Italio. La tiea esperantista fervojista grupo "La Gondolo", krom starigi dektagan informan ekspozicion en la stacidomo, enprogramigis altnivelan prelegon fare de prof. Mario Dazzini pri la temo "Esperanto kiel eduko al Eŭropa unuiĝo - Esperanto kiel eduko al internacieco". (Raportis P.G. Soranzo)

## Komuniko pri El Popola Ĉinio

Pekino (pp) - La Esperanta Sekcio de Guozi Shudian, Centro de ĉinaj eldonaĵoj, komunikas, ke laŭ sciigo de la redakcio de El Popola Ĉinio la novembra kaj decembra numeroj (11/76 kaj 12/76) de la ĉina Esperanto-revuo eldoniĝos en komuna kajero. Tiu komuna kajero prokrastas aperi kaj supozeble ĝi aperos pli malfrue ol la januara numero de 1977. Krome la 1977-abonvarba kampanjo por EPĈ estas plilongigita je unu monato, t.e. ke la kampanjo daŭros ĝis la fino de februaro 1977.

## Nova informbroŝuro

Nürnberg (pp) - Aperis nun kiel belaspekta broŝuro la artikolo de Dr. Artur Baur "Von der Utopie zur Wirklichkeit Die Geschichte der Plansprachen" (De la utopio al realeco La historio de la planlingvoj), kiu en junio 1976 aperis en la svisa gazeto "Der Landbote" kaj pri kiu Pilo-Press siatempe detale raportis. La broŝuron eldonis Esperanto-Kultur-Centro, La Chaux-de-Fonds kaj Sarlanda Esperanto-Ligo. Ĝi estas havebla ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Prezo 1,20 GM + afranko!

Grava evento - Vatikana Radio en Esperanto

La unua regula elsendo en Esperanto de Vatikana Radio okazis dimanĉe, la 2-an de januaro 1977 laŭ la antaŭanonco en Pilo-Press. La elsendo estis bone kaptebla kaj aŭdebla sur meza ondo 196 m (1529 khc). Parolis pastro Giacinto Jacobitti, tri aliaj pastroj kaj sinjorino, kiu jam antaŭe prizorgis la noktmezan anguleton. La enhavo de la elsendo estis mirige pozitiva kaj simpatia por Esperanto; en mallonga leterkesto oni klarigis kial la Vatikano enkondukis Esperanton. Skribu al Radio Vaticana, Redazione Centrale, Esperanto, Città del Vaticano.

Vatikano konkurencas al Radio Roma

Entute, la pozicio de la Esperanto-programo de Vatikana Radio videble plifortiĝis, dank' al la senlaca agado de la esperantistoj...Nun por konservi tian pozicion, kaj laŭeble plibonigi ĝin, estas necese, ke oni ne forlasu la aferon, do ke oni senhalte sendu sufiĉajn korespondaĵojn des pli ke pro la nova horo (21,05 - 21,15 horo) kaj pro la potencaj instalaĵoj de Vatikana Radio la aŭskultado fariĝos tre pli facila kaj ĝuebla ol iam.

Nur makuleto kovras nian kontenton pro la atingo ĉe Vatikana Radio.... Estas bedaŭrinde, ke por la nova horaro oni elektis ĝuste periodon, dum kiu en la etero jam cirkulas du Esperanto-programoj, nome tiuj de Radio Roma, kiu elsendas de la 21,oo ĝis 21,20 horo, kaj tiu de Radio Sofio, kiu dissendas de la 21,00 ĝis 21,30 horo. Des pli domaĝe, ĉar Romo kaj Vatikano ankaŭ dissendos sur tre proksimaj ondlongoj...kaj Vatikano estas almenaŭ 10-oble pli potenca ol Romo, do tre verŝajne ekestos ĝenoj por la aŭskultantoj de Radio Roma.

Pri la novaj teknikaj problemoj oni atentigos la respondeculojn de la itala radio, kaptante la okazon por denove kaj insiste peti ŝanĝon de horo kaj de frekvencoj, aŭ - eĉ pli bone - ripetadon de la programo en aliaj tago kaj horo.

Tiucele, ni fidas je la helpo de niaj aŭskultantoj (efektivaj kaj potencialaj), kiuj estas varme petataj skribi eĉ simplan poŝtkarton al nia adreso (Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma, Italio), plendante pro la malfacilaj aŭskulto-kondiĉoj.

(Laŭ Kuriero de Esperanto, Radio Roma)

Mallongonda Servo Svisa. La unua prelego ĉi-jara de d-ro A. Baur temis denove pri la romanĉa lingvo kaj la regiona principo, kiu garantias la interlingvan pacon en Svislando. Laŭ tiu principo ĉiu lingvo havas sian teritorion. - Ges-roj Gacond en siaj pasintaj elsendoj parolis pri unuopaj programeroj de la interlingvistika konferenco en Paderborn fine de novembro 1976. Kritike ili traktis la lingvo-orientiĝan instruadon laŭ la Paderborna modelo.

Zagrebo. La Esperanto-voĉo silentis la 31-an de decembro, anstataŭe la stacio elsendis silvestran programon en nacia lingvo.

Vieno. ORF Wien elsendis dum la unua ĉi-jara programo felietonon pri la"dancantaj ĉevaloj de Vieno", la Lipicanoj, kaj recenzon pri la libro "Bodil kaj la bando", aperinta en Dana Esperanto-Eldonejo.

Varsovio. Dum la unua Esperanto-Ekspreso ĉi-jara oni povis aŭdi la novjaran mesaĝon de la UEA-prezidanto Humphrey Tonkin. La tekston de tiu mesaĝo oni povas legi en ĉi tiu numero de PP! Sed ne mankis la novjara parolado de Edward Gierek en la Esperanta traduko kaj aliaj politikaj komentarioj pri jarŝanĝaj kaj mondpolitikaj problemoj. La unua trarigardo de la Esperanto-gazetario sin okupis ĉi-foje ĝenerale kaj principe pri la Esperanto-gazetaro, ĝia nuna stato. Oni povis aŭdi opiniojn de aŭskultantoj, laŭ kiuj la E-gazetaro ŝajnas troviĝi en krizo. Kun scivolemo la aŭskultanto interesita pri statistiko certe atendas la finan rezulton de korespondaĵoj en 1976. Ĉu pleniĝos la nombro 6000? Laŭ la lasta leterkesto 1976 la redakcio ricevis 5 770!